EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA ILEI IF EF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 71>** •AMO pli • Pollando • Panteono • Z-festoj **< decembro 19**

# AMO ĝis la centa numero!

Per la raporto pri AMO 96 el Senegalo, ni fermos la jaron 2022.

Miaj esperoj por AMO en la frua 2023 estas jenaj:

> AMO 97 Prizorgos SMG kun temo 'Pacifika Progresigo'
>
> AMO 98 Kroatio, feb pri la Semajno de Internacia Amikeco (SIA).
>
> AMO 99 ne fiksita, eble marto, invitoj bonvenaj! ILEI eble volus.
>
> AMO 100, espereble en Hungario, sed malfacilegas realigi tion.

La jara resumo pri AMO tra 2022 aperis en la revuo *Esperanto*, surprize, unu monaton pli frue ol kutime, jam en la decembra numero, sur p 250. Ĝi indikas rekordan nombron da seminarioj – dek kvin.Tio enprenis du novajn landojn: Israelon kaj Litovion. Inter la aktivaj kunlaborantoj de la programo, ni povas kalkuli la fakan asocion por kolektistoj kaj filatelistoj: ELF-AREK. Uunafoje seminario okazis en provinco de Kubo longe for de la ĉefurbo.

# Pola Medalo por Roman Dobrzyński

Danke al iniciato de Pola Esperanto-Asocio (PEA), la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo de Pollando, Prof. Hab. D-ro Piotr Gliński, decidis aljuĝi al la fama pola esperantisto Roman Dobrzyński gravan ministerian distingon: la bronzan medalon Merita por Kulturo "Gloria Artis". En sia propono PEA emfazis la signifan kontribuon de Dobrzyński por popularigado de kulturo ĝenerale kaj liajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam en 1987 li ĉeforganizis la plej grandan Universalan Kongreson en Varsovio; kaj kiel televida raportisto, pro kio li atestis gravajn historiajn eventojn kaj realigis ĉ. 300 dokument-filmojn.

Roman Dobrzyński naskiĝis en 1937 kaj esperantistiĝis en 1955. Li magistriĝis pri juro kaj poste pri ĵurnalismo per tezo pri la Esperanta gazetaro. Kiel studento li aktivis en la Esperanto-movado per verkado, redaktado kaj instruado, kaj kiel estrarano de Pola Esperanto-Junularo. Li estis vicprezidanto de TEJO (1966-68) kaj redaktoro de *Kontakto* (1968-70). De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido kaj en tiu rolo multfoje traktis Esperanto-rilatajn temojn, farante ankaŭ filmojn pri Esperanto, ekz-e "Bona Espero" (1984). Jam en 1980 la Asocio de Polaj

Ĵurnalistoj elektis lin la plej bona publicisto pri internaciaj aferoj. En 1995 li cetere iniciatis la esperantigon de “Mazi en Gondolando”, de BBC. Li estas membro de UEA ekde 1961 kaj estis komitatano kaj vicprezidanto de UEA (! 1989-92). Li kontribuis al la establo de Fondumo Zamenhof kaj estis ĝia unua prezidanto. En 2003 aperis lia libro *La Zamenhof-strato*, pri interparoloj kun D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, poste tradukita en multajn lingvojn. En 2005 li estis elektita Honora Membro de UEA kaj ricevis la unuan premion de la Fondaĵo Grabowski pro siaj esperantlingvaj filmoj kaj la verko *La Zamenhof-strato*.

Dobrzyński estas elstara ĵurnalisto kaj poligloto, ĝis nun – 85-jaraĝa – tre aktiva sur diversaj kampoj rilataj al Esperanto, internacia kunlaborado kaj ĵurnalismo. En interkonsento kun Bjalistoka Esperanto-Societo estis decidite, ke taŭga okazo por enmanigi la medalon al Dobrzyński estos la 23-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj. La solenaĵo okazos en Bjalistoko kaj la medalon transdonos la vojevodo (provincestro) de Podlaĥia Provinco, S-ro Bohdan Paszkowski. UEA gratulas al Dobrzyński pro la meritoplena honorigo.

Laŭ Gazkom de UEA

# Panteono refreŝigita – pli da merituloj

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj.

Titolo: Dek du novaj personoj en la Panteono
Kategorio: Laste ĉe edukado
Okaze de la 21a naskiĝtago de la paĝaro de edukado.net ni denove festas per premiado de personoj, kies agado en tiu ĉi jaro aŭ dum vivlongo multe kontribuis al la instruado kaj disvastigo de nia lingvo.

Katalin Kovats prezentas la ĉi-jarajn premiitojn per tekstoj kaj filmo.

Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=883

# Esperantisto de la Jaro

Je la Zamenhofa Tago estis anoncita la rezulto, jam la 25-a (ekde 1998), elekto de la Esperantisto de la Jaro: ĉi-jare ĉi tiun honoran titolon ricevis la 56-jara brita matematikisto, komputisto kaj esperantisto Edmund Grimley Evans. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2022/12/jaro-6/

---

**Ni estas kontraŭ milito, ni estas por paco!** https://sezonoj.ru/

# Belartaj Konkursoj resumitaj




Disponeblas en la Libroservo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) la libro “Belarta rikolto 2022”, kun premiitaj verkoj de la 73-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA, tra deko da jaroj, anoncitaj ĉi-jare en la 107-a Universala Kongreso (UK) en Montrealo. La libro estas parto de la eldona agado de UEA kunlabore kun la eldonejo Mondial el Novjorko. Kun 121 paĝoj ĝi enhavas poezion, prozon, mikronovelojn, teatraĵojn, monologojn/skeĉojn, eseojn kaj kantotekstojn. Eblas ĝin aĉeti rekte en la Libroservo: https://katalogo.uea.org?inf=8614.

Laŭ la regularo de la Belartaj Konkursoj la premiitaj verkoj estas aperigitaj en eldonaĵo subtenata de UEA. Ekde 2013 Mondial publikigas ilin sub la titolo “Belarta rikolto”: https://mallonge.net/belarta. Tio signifas, ke la “Belarta rikolto 2022” estas la deka en la serio. Aldone, en 2021 Mondial aperigis la libron “Ne ekzistas verdaj steloj”, kun 60 mikronoveloj rikoltitaj el la Belartaj: https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8783.

En 2023 la premi-ceremonio de la 74-a okazigo de la Belartaj Konkursoj okazos dum la 108-a UK en Torino. Eblas plej favorpreze aliĝi al la 108-a UK ĝis la 31-a de decembro 2022: https://uk.esperanto.net/2023. Interesatoj povas sendi kandidatajn verkojn ĝis la **31-a de marto 2023**. La alvoko kun ĉiuj detaloj legeblas ĉe https://uea.org/gk/1063. Ĉefrespondecas pri tiu agado la Komisiono pri la Belartaj Konkursoj, kiu ankaŭ prizorgas paĝon pri la konkursoj ĉe Facebook: https://www.facebook.com/belartajkonkursoj.

# Festado en Burundo

Festado en Burubdo (konservenda la mistajpo!)
El la festo de la zamenhofa tago kun la infanoj en la infanĝardeno en Rumonge. “Estis granda ĝojo festi kun la infanoj specialan tagon, kiu markas la naskiĝon de la fondinto kaj kreinto de la lingvo Esperanto. Ni dankas al BAVELO kiu subtenis tiun ĉi agadon proponante manĝaĵojn al la infanoj.’

# Festado en Madagaskaro



Dankegon al Ranja kaj ŝiaj gelernantoj, kiuj kunfestis en Itaosy kun s-ino Lala kaj la gemembroj de Itaosy-Esperanto-Klubo la naskiĝ-tagon de L.L. Zamenhof, la kreinto de la lingvo Esperanto.

# Pollande eblas gajni la futbalon!

Uzantoj de la telefona Aplikaĵa Programo de *McDonald's* en Pollando povas partopreni lotumadon de pilkoj Adidas Al Rihla League Ball, inspiritaj de la oficiala pilko de la Futbala Mondpokalo 2022. Kiel oni scias, sur la pilko estas teksto en 6 lingvoj, i.a. en Esperanto.

La 18-a de decembro estas la lasta lotum-tago en la lando. Oni disponigis entute 15 000 pilkojn. Ĉu ankaŭ en aliaj landoj tia projekto funkcias? La pilko povas esti uzata kiel reklamilo pri Esperanto.

Maria Majerczak

SMG: Tre utilus scii por la aliaj landoj, kie komenci por peti similan konkurson!

# Atako de la karnivoroj

Jen nia averto al ĉiuj komputilaj uzantoj. Mi spertis teruran atakon de la komputika karnivoro. Tiu feroca besto manĝas kaj detrue digestas miajn dosierojn, kaj rifuzas komuniki al mi en kiu el sennombraj stomakoj ili estas findeigestitaj.

Konkrete, mi plene kaj neretroveble perdis miajn kolektejojn por EKO 71 kaj 72. Tiu de 71 estis jam plenega; EKO 72 ĉefe rezervis lokon por raporto jarfina el AMO 96, kadre de la 8-a Afrika Kongreso en Senegalo.Tion mi rekreos kiam mi ricevos la raporton. La bildo montrasal vi la timigan aspekton de la dokumento-voran minacon.



Mi profunde pardonpetas al tiuj, kies eroj aperis en la forvoritaj dokumentoj, eĉ mi apenaŭ povas scii, kio estas tie forstokita.

Mi jam delonge estas skeptika pri mia komputilo, sed eble nun, mi estas eĉ pli malfidema, kaj savos eĉ la kolekejan dosieron antaŭ la kontrola fazo kiu aŭtomate protektas la tekston,al diversaj lokoj ekster mia komputilo.

Do, la nuna rekreita dokumento ĉefe prenas erojn celitajn por EKO en 2023.

Do, EKO bondeziras al vi agrablajn jarfinajn festojn kaj promesplenan novan jaron!

========= vortoj:  1220 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.